

M

Rudolf Gottlieb MAEDER

1900-1940



M. estis apotekisto kaj redaktoro de la revuo *Die Schweizer Hausapotheke*. Krom tio li prezidis la svisan jahtklubon sur la Konstanca Lago, kie en 1938 li enkondukis novan ŝtormavertan sistemon, kaj li estis ankaŭ prezidanto de la kristkatolika eklezia komunumo en St. Gallen (1939).

Dum la 1930aj jaroj la Nova EK de St. Gallen estis gvidata de M., kiu aliĝis al la Eo-movado en 1928. Poste M., kiu 1932-37 rolis ankaŭ kiel prezidanto de SES, estis nomita honora membro de la Nova EK. M. kunlaboris kun la redakcio de *Internacia Medicina Revuo*, organizis diversajn lingvo-kursojn de Andreo Cseh kaj Tiberio Morariu kaj mem ofte prelegis. La nekrologo en *SE* 1/1940 omaĝis lin kiel nekutime pozitivan personecon, kiun karakterizis granda talento kaj laborkapablo, rapidaj decidoj, severa logiko, justeco, firmeco kaj pacemo.

→ St. Gallen → Svisa Esperanto-Societo

Emmerich MANNER **(Mirko MAMUŽIĆ)**

1928-1998



M. estis eksa jugoslaviano kun hungara gepatra lingvo. Post la lernado en la gimnazio en Sombor (Vojvodino) kaj la studado en la teknika fakultato de la zagreba universitato M. diplomiĝis kiel maŝinfaka inĝeniero. Fine de la 1960aj jaroj li elmigris al Svislando, kie li ekloĝis en Nussbaumen (komunumo Obersiggenthal/AG). En 1985 li akiris la svisan civitanecon kaj tiuokaze ŝanĝis sian nomon (Emmerich M.). Dum 26 jaroj li laboris kiel inĝeniero-projektanto en la svisa firmao Motor Columbus, kie li okupiĝis pri la projektado de elektraj kaj nukleaj centraloj.

Kiel e-isto de 1947 M. estis iam komitatano kaj poste prezidanto de la zagreba ES, komitatano de Kroatia Eo-Ligo kaj membro de ties ekzamena komitato. Li gvidis dudekon da lingvokursoj kaj dum kelkaj jaroj estis parolisto de la Eo-elsendoj de Radio Zagreb. M., kiu konis plurajn lingvojn, verkis gramatikan kompendion, sep teatraĵetojn publike prezentitajn kaj tradukis al Eo poemojn el la jugoslavia literaturo. En 1967 li aliĝis al la svisa Eo-movado kaj estis dum kelkaj jaroj komitatano de la zurika ES. Kiel plujara prezidanto de la ekzamena komitato de SES li organizis Eo-ekzamenojn en Baden, Berno kaj Zuriko. En la zurika ES li ofte prelegis pri gramatikaj, movadhistoriaj kaj beletraj temoj kaj raportis ankaŭ pri siaj oftaj privataj vojaĝoj. Kune kun sia edzino Mira (ankaŭ e-istino) li vizitis plurajn UK. Li posedis riĉan kolekton de libroj, diskoj kaj diapozitivoj. Post sia pensiigo M. komencis traduki novelojn de la hungara aŭtoro Dezsö Kosztolanyi

(1885-1936) kaj kompili novan Eo-
lernolibron por progresantoj.

Nicole MARGOT

*1943. Loĝas en Lausanne VD



Emerita instruistino en Laŭzano. Eklerninte Eon en 1964, M. dum pluraj jaroj frekventis la TEJO-medion kaj partoprenis la agadon de SEJ. Reveninte el Egiptio, kie en 1968 ŝi instruis dum unu jaro en la svisa lernejo, ŝi kunvenigis la tiamajn svisajn gejunulojn por starigi Eo-junularan asocion. Ŝi estis la unua prezidanto de SEJ, sed ne longe kaj baldaŭ transdonis la postenon al →Andres Bickel. Komence de la 1970aj jaroj M. portempe paŭzis en la Eo-movado kaj revenis al ĝi nur en 1978. Tiam ŝi ekkunlaboris kun la Koooperativo de →Literatura Foiro kiel sekretario de la konkurso 'La Verko de la Jaro'. Intertempe ŝi fariĝis prezidantino de la laŭzana ES kaj komencis instrui Eon. Ŝi trapasis la mezan lingvan ekzamenon de ILEI kaj poste la porinstruan. En la 1980-90aj jaroj M. organizis, kunlabore kun la laŭzana ES, la romandajn kulturajn semajnfinojn en Cully/VD, kaj membris unu jaron en la direkta komitato de KCE kiel respondeculino pri libroservo. Iam ŝi estis ankaŭ redaktorino de →*Lozana Informilo* kaj partoprenis en la redakta laboro de →*Transalpa Esperantisto*, krome ŝi apartenis al la estraro de SES (1989-2006). Kiel aktivulino de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) ekde 2004 M. redaktas ĝian revuon *Etnismo*. Tiuokaze ŝi eklernis la vaŭdan regionan dialekton kaj fariĝis estrarinino de la Vaŭda Asocio por regiona lingvo (Association Vaudoise des Amis Patois).

En somero 2004 M. partoprenis, kiel observanto de SES, la 6an Eŭropan Kongreson de Eo en Bilbao, kiu estis organizita de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

→Vaŭdo

Perla (ARI-)MARTINELLI

*1938. Loĝas en La Chaux-de-Fonds NE



Italino vivanta de 1978 kun sia dua edzo →Giorgio Silfer (*1949) en Svislando, svisa ŝtatanino ekde 1996. La unua edzo de M. estis la konata itala e-isto Aldo de' Giorgi (1924-2003), ilia komuna filino nomiĝas Christina (*1960). M. kleriĝis kiel diplomita tradukistino kaj eldona grafikistino kaj laboris multajn jarojn kiel lingvo-instruistino.

M. lernis Eon en 1953, ekaktivis kiel baza e-isto, tuj kontribuante al la kultura vivo de Eo en Italio, kiel kluba bibliotekisto, per prelegoj kaj kiel unu el la organizantoj de la 40a Itala Eo-Kongreso en 1969. M. posedas la diplomon pri Eo-instruado de Itala Instituto de Eo kaj la pedagogian ateston de Franca Eo-Instituto. En la 70aj jaroj ŝi engaĝiĝis kiel sekretario de la konkurso *La Patrolo* (1973) kaj transprenis taskojn kiel redakcia sekretario (1974), ĉefredaktoro de *Literatura Foiro* (1980-95) kaj grafika respondeculo en Koooperativo de →Literatura Foiro (ekde 1984). 1978-81 ŝi plenumis la taskon de la sekretario de KCE en La Chaux-de-Fonds. 1994-97 ŝi estis prezidantino de SES, poste vicprezidantino (ĝis 2001). En 1989 ŝi estis elektita al la Akademio de Eo, 1995-98 ŝi oficis kiel ties ĝenerala sekretario. Ŝi apartenas al la kunfondintoj, en 1991, de la Ea PEN-Centro, agnoskita en 1993 de PEN Club International. M. kunlaboris kun la redakcio de la *SUK-kajero* pri sciencfikcio, kunredaktis la dokumentaron *La Sesdekoka*,

dokumentaron *La Sesdekoka, ĉu decida jaro?* (1978), kompilis revizie *Eo-italan vortaron* en 1977. Kunlabore kun Gaston Waringhien (1901-91) ŝi tradukis, redaktis kaj prinotis la unuan parton de *Dekamerono* de Giovanni Boccaccio. 1997-99 M. estis respondeca redaktoro de *Heroldo de Eo*. En 2001 M. estis elektita al la Senato de la →Esperanta Civito. M. publikigis disertacion pri la temo *Edmond Privat: la vita e l'opera* (Centro Italiano di Interlinguistica, Genova 2004, 206 p.).

→Literatura Foiro →KCE →SES

MONATA CIRKULERO (KCE)



Karakteriza titolpaĝo de *Monata Cirkulero*

Iama organo de →Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj →Gastejo Edmond Privat (GEP), de 1992 ankaŭ de la svisa KELI-sekcio. Ĝi aperis en La Chaux-de-Fonds inter 1969 kaj 1994. Fondis kaj longe redaktis ĝin →Claude Gacond (ĝis n-ro 187/1990), poste respondecis prie la KCE-teamo kaj →Andreas Künzli (1993-94). La plej lasta eldono estis n-ro 243. Precipe en la tempo de Gacond MC disponigis ne nur unikan kolekton de informoj kaj kronikoj pri la vivo kaj funkciado de KCE/GEP, sed en ĝi estis publikigitaj ankaŭ signifaj kontribuoj pri esperantologio kaj interlingvistiko. Poste kaj ĝis 1999 aperis ĉe KCE sub →Giorgio Silfer informilo sub la titolo *Ĉe la Domparo*.

→Bibliografio (gazetaro) →KCE

Daniel R. MUHLEMANN (MÜHLEMANN)

*1950. Loĝas en Nyon VD



Post sia abiturienta ekzameno en Baden/AG la argoviano M. studis konstru-inĝenieradon en la svisa politeknika altlernejo en Zuriko por fariĝi diplomita inĝeniero (dipl. Ing. ETH). Post profesiaj aktivecoj en diversaj inĝenieraj oficejoj li eklaboris en 1983 sur la kampo de la prevento de trafikaj akcidentoj. Fine de 1982 li forlasis la alemanan parton de Svislando kaj ekloĝis en Romandio, kie li vivas kun sia pola edzino kaj e-istino (Barbara Pruchnicka) kaj la familio.

M., kiu jam en sia infanaĝo legis la SJV-kajeron *Deine zweite Sprache* de →Arthur Baur, lernis Eon en 1971. Kadre de SEJ M. organizis, kun la helpo de →Maurizio de Sassi, dum kelkaj jaroj la somerajn migradojn en la Alpoj. En 1972-73 M. estis prezidanto de SES. En 2003 M. akceptis la oficon de prezidanto de KCE.

→Familioj →Junularo →SES →KCE

Jacques MÜHLETHALER

1918-1994



M. estis internacie konata pacaktivulo, kiu rifuzis la francan Vichy-reĝimon, kritikis la francan naciismon kaj en 1941 enmigris Svislandon. Fondinte en 1946 unikan distribuejon por francalingvaj lernejoj eldonadoj, M. klopodis transformi la lernejojn al civitisma, supernacia kaj homarana edukejo. Tiucele en 1967 li entreprenis vojaĝon ĉirkaŭ la mondo por klarigi al la registaroj siajn ideojn pri demokrata pedagogio, mondcivitaneco kaj laikeco en la instruado. Samjare li starigis la *Mondan Asocion por la lernejo kiel pacinstrumento (EIP)*, kiu instaligis en Ĝenevo kaj kiun li funkciigis kaj prezidis dum kvaronjarcento. Liaj provoj diskonigi simpligitan version de la universala deklaro pri la homaj rajtoj kontribuis al la ekstraktado de la homaj rajtoj en ĝenevaj lernejoj. 1970-74 M. prezidis la Svisan Ligon pri homaj rajtoj. En 1975 li malsatstrikis kontraŭ la altegaj porarmeaj elspezoj. Iom post iom pedagogoj el la tuta mondo ekatentis la signifon de lia porpaca agado, partoprenis la kursojn de EIP, kun la rezulto, ke fondiĝis trideko da naciaj sekcioj de EIP. En 1987 M. kreis ankaŭ la *Internacian Centron de formado kaj instruado de la homaj rajtoj kaj de la paco (CIFEDHOP)*. Pro porpacaj meritoj M. kaj lia signifa neregistara organizo EIP kun konsulta statuso ĉe UN, Unesko, Eŭropa Konsilio k.a. rikoltis altrangajn distingojn. Ankoraŭ en 1992 M. vojaĝis tra la novaj ŝtatoj de eksa Sovetunio por propagandi la signifon de la demokratio pere de la kreado de novtipa pedagogio.

Konstatinte paralelon de siaj porpacaj konsideroj en la zamenhofa homaranismo, M. interesiĝis pri Eo, iom kunlaboris kun KCE kaj kontribuis al la distribuo de Eo-libroj tra svisaj librovendejoj. Kvankam M. ne aktive uzadis la lingvon Eo kaj ne estis membro en Eo-asocioj, li publike aprezis ĝin en diversaj okazoj kiel dum la kunvenoj de Unesko kaj de la neregistaraj organizoj, substrekante ĝian porpacan karakteron kaj rekomendante ĝian mondvastan aplikadon. En letero el la jaro 1993 al KCE, M., jam tre malsana, skribis, ke „Eo trovas larĝan lokon“ ĉe li kaj esprimis la deziron pli ofte organizi publikan manifestacion cele al la diskonigo de Eo. Pro alta aĝo li tamen ne plu povis dediĉi sin al tiu tasko.

N

NATURAMIKOJ

La N. ne povas lerni ĉiujn lingvojn kaj idiomojn necesajn por interkompreniĝi dum vojaĝoj eksterlanden, sed helpe de la internacia lingvo Eo ili trovas ĉie geamikojn, kun kiuj ili povas interŝanĝi pensojn, ideojn kaj spertojn. Aliflanke la e-istoj povas trovi ĉe la N. bonan okazon por elprovi kaj apliki sian lingvon, vojaĝante en ilia amika rondo.


Baldaŭ post la fondo de la naturamika movado en 1895 en Vieno (Aŭstrio) ekestis tendenco serĉi kontaktojn trans la landlimojn, kaj la unuaj klopodoj utiligi Eon por la celoj de la naturamika movado estis farataj. En 1926 estis fondita la Naturamika Fakgrupo Esperanto, inter kies anoj menciindas la mekanikisto-ilaristo *Karl Hiltpold* (1887-1966), loka aktivulo naturamika en Montreux-Vevey/VD. Kun sia edzino Frieda Weber (1891-1984) li aliĝis al la Eo-movado en 1920. Al li oni dankas, ke en la jaro 1921 la nove inaŭgurita naturamika domo en la valo de Villard, super la Lemana Lago (Lago de Genève), ricevis la esperantlingvan nomon 'Frateco'. En la Vogezoj troviĝis alia naturamika domo (1931), kie kunvenis kun la N. ankaŭ laboristaj e-istoj. Sciigoj aperis en la organo *Der Naturfreund*. Tuj post la dua mondmilito, kiu interrompis la naturamikan aktivadon, → *Walter Kobelt* (*1910) aktivis en la Naturamika Internacio (NAI) en Arbon/TG, kie li klopodis, pere de Eo, disvastiĝi la naturamikan movadon (TAN) eksterlande, precipe en Britio, kie ĝi ankoraŭ ne ekzistis. Krome Kobelt tiam ankaŭ sukcesis akiri la permeson prizorgi Eo-rubrikon en la internacia organo *Der Naturfreund*, tiel ke en 1949-52 povis aperi en ĝi Eo-kurso. Ankaŭ la germanaj organoj *Wandern und Bergsteigen*

kaj *Aufstieg* transprenis tiun kurson. En 1947 okazis unuafoje internacia feriosemajno de la Eo-N. en la TAN-domo Reutsperre super Meiringen/BE, en kiu partoprenis 52 N. el 10 landoj. En 1949 okazis dua feriosemajno en la NAI-domo Frateco super Montreux. Aliaj kamaradoj okazigis aranĝojn en Aŭstrio, Germanio kaj Belgio. Kelkaj e-istoj partoprenis ankaŭ en la 14a ĉefkunveno de NAI en Celerina/GR. Dum tiu kongreso la ĉeestantaj e-istoj decidis prepari la fondon de internacia fakgrupo. En aliaj grandaj naturamikaj kongresoj Eo eksonis pli kaj pli ofte kaj vastskale. Krom en la gravaj eksterlandaj naturamikaj periodaĵoj, ekde 1953 ankaŭ en la svisa organo *Berg Frei* (poste *Naturfreund / Ami de la Nature*) regule aperis Eo-rubrikoj. En 1955, okaze de granda NAI-ekspozicio en Zuriko, estis aranĝita Eo-angulo, helpe de la naturamika aktivulo *Gottfried Keller* el la TAN-sekcio Zürich-Albisrieden. Kun Keller kunlaboris en la estraro Ruth Schörli, Werner Schaufelberger, Alice Kessler kaj → Maurizio De Sassi. La rezulto de tiu ekspozicio estis la organizado de tri kursoj en la TAN-grupoj de Zuriko, Oerlikon-Seebach kaj Winterthur. En 1951 la Eo-N. ekhavis sian propran revuon *La Migranto*. Kaj samjare dum la 36a UK en Munkeno estis fondita la unua (provizora) TANEF-komitato. En 1956 dum la NAI-kongreso en Hamburgo sekvis la decido, ke TANEF estu oficialigita kiel fakgrupo en la Internacio NAI sub la oficiala titolo Eo-Fako de la Naturamika Internacio. En 1965 Internacia Turista Asocio La N. inkluzivis Eon kiel lingvon en sia statuto. La TANEF-jarkunveno de 1993 okazis en La Chaux-de-Fonds. La tritaga kongreso de la Naturamika Internacio estis organizita en septembro 2002 en Wildhaus/SG.


Gravan aktivulinon TANEF trovis en la persono de → *Erna Döring* (*1920) el Bazelo, kiu en 1975 pretis transpreni la redaktadon de *La Migranto* kaj kiu restis en la ofico kiel internacia fakreferantino de TANEF por Eo dum 20 jaroj ĝis 1996.

Ernest NAVILLE

1816-1909



N. estis kristana filozofo, evangelia teologo, sciencisto, verkisto, moralisto kun internacia signifo, sed ankaŭ ĝeneva kaj svisa patrioto, politike aktiva homo kiel protagonisto de la proporcia balotado kaj reprezentado, rifuzanto de la monopolo de politikaj partioj. Post teologiaj studoj en Ĝenevo (1835-39), en 1844 N. fariĝis instruisto pri filozofia historio en la libera gimnazio kaj docento pri teologio en la ĝeneva universitato. Iam N. prezidis la studentan societeton Zofingia kaj estis korespondanto kaj eksterlanda asociito de la Akademio de moralaj kaj politikaj sciencoj kadre de Instituto de Francio en Parizo.



Naville juna kaj maljuna (supre) kaj en sia oficejo en 1907 (sube)

N., kiu konis la opiniojn de René Descartes (1596-1650) kaj Gottfried Wilhelm Leibniz (1646-1716) rilate la demandon de la neŭtrala universala lingvo, estis unu el la malmultaj sciencistoj en la 19a jarcento, kiuj malignoris tiun neglektatan temon. Ŝajnas, ke jarojn

antaŭ la apero de Volapük (1879) kaj Eo (1887) N. diskutis tiun temon (laŭ notoj de lia nepino) kun personecoj kiel la badena grandduko, supozeble en 1866. Kvankam N. principe favoris la revivigon kaj universaligon de la greka aŭ latina lingvo li konsciis pri la malavantaĝoj de tiuj klasikaj lingvoj kaj ke ili ne povas ludi la rolon de neŭtralaj universalaj lingvoj en la moderna tempo, i.a. ĉar ili estas tro malfacile lerneblaj. Same li skeptikis, ke tion kapablus vivantaj nacilingvoj, ne nur ĉar ili same estas malfacile lerneblaj, sed ankaŭ pro la rivaleco kaj la konkurenco inter la popoloj, kiun implicas tiaj lingvoj. Volapukon N. konsideris fiaskita, morta. Kiam li eksciis pri la zamenhafa lingvo li fariĝis varma simpatianto kaj propagandanto de Eo.



Naville en sia oficejo

Por formi al si definitivan opinion, N. atentis la pritakson de la rusa verkisto Lev Nikolaeviĉ Tolstoj (1828-1910) kaj konsultis la german-britan lingviston Max Müller (1823-1900) pri lia vidpunkto koncerne Eon. Kiam la elstara sciencisto respondis pozitive, N. sendis en 1899 al la Akademio de moralaj kaj politikaj sciencoj kadre de Instituto de Francio klaran rekomendon pri la graveco de la neŭtrala universala lingvo kaj speciale de Eo (*La Langue internationale*, 1899; → Antologio) kaj verkis pri ĝi favoran artikolon en *Biblio-*

thèque Universelle (marto 1890). Por N. la enkonduko de neŭtrala universala lingvo signifis urĝan bezonon de la moderna civilizo, ĉar li konsideris, ke per tia lingvo la homoj de la terglobo povus pli facile interŝanĝi siajn ideojn kaj komuniki siajn sentojn, la junularo povus senpeziĝi de la studa superŝarĝo kaj pli spontane disvolvi la intelekton kaj la pensadon. Surbaze de tiuj konstatoj N. pledis por la instruado de Eo en ĉiuj duagradaj lernejoj de la tuta mondo. Kun tiuj argumentoj N. publike pledis por Eo ankaŭ dum la Universala Filozofia Kongreso (Ĝenevo 1904).

Pro malbona sanstato N. estis malhelpata persone rilati kun e-istoj kaj devis rezigni ĉeesti la unuan jarkunvenon de SES en Rolle/VD en 1903, al kiu li estis invitita. Sed li mesaĝis certigon al la kunsidantoj, ke li aprobas Eon. Pro tio SES atribuis al li la unuan honoran prezidantecon. En 1904 N. povis partopreni la duan jarkunvenon de SES en Coppet/VD, kie laŭ rakonto de →Edmond Privat, kiu ĝuis la fidon de la filozofo, N. laŭtleĝis la festenan menukarton en Eo. En 1906 la maljunega eminentulo ankaŭ ne povis viziti la 2an UK en Ĝenevo, sed li denove sendis kuraĝigan leteron al la kongresanoj. En malferma letero de 1908 al Sebert N. alvokis la e-istojn rezigni pri lingvoreformoj, kiuj laŭ lia opinio fakte malhelpus la progreson de Eo. La entombigon de N. en 1909 partoprenis pluraj ĝenevaj e-istoj.

Postmorte, en 1910, aperis lia ĉefverko *La Devo* en Eo-traduko de →René de Saussure. En 1978 unu el la domoj de GEP/KCE (strato Postiers 27) ricevis la nomon de N.

→Ĝenevo →Svisa Esperanto-Societo
→Bibliografio →Antologio



NEUCHÂTEL


Kantono en okcidenta Svislando franclingva (franclingve: Neuchâtel, mallong. NE: 803 km², 169'000 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Neuchâtel.

Kun Ĝenevo kaj Vaŭdo N. estas tiu svisa kantono, kies grundo pruviĝis plej fekunda

por la Eo-ideo. Laŭ *EdEo* (1933), kiel „unua provo ekplanti Eon en la ŝtonan teron de Svislando estas konsiderata la Eo-parolado en 1898 de →*Alfred Paul Dubois* (1853-1918), lerneja direktoro en Le Locle/NE. Poste li realigis, kun aliaj Eo-pioniroj de la Neŭŝatela Ĵuraso kiel →*Edouard Ducommun*, *Henri Favre*, *Paul Humberstet*, sciencisto kaj UEA-delegito, *Amélie Montandon* (Vaucher) kaj *Maurice Montandon* (ĉiuj instruistoj) Eokurson por la instruistoj de la urbo Le Locle kaj starigis lokan EG. La profesia kudristino *Amélie Montandon* aliĝis en 1905 al la Eomovado, ĉeestis la 2an UK en Ĝenevo (1906) kaj sinsekve aliajn UK, estis UEA-delegito de UEA en La Chaux-de-Fonds kaj helpis al suferantaj samideanoj en najbaraj landoj.



Edouard Ducommun kaj Paul Humberstet (Soloturno 1909)




Edouard Ducommun kaj Paul Humberstet

Neŭŝatela Ĵuraso: Laŭ la protokolo (kiu estas konservita ĝis 1926) la EG *Le Locle* estis fondita la 22an de februaro 1904 sub la prezido de Edouard Ducommun. Laŭ la UEA-Jarlibro de 1933 la EG *Le Locle* havis 40 membrojn.

→*Edouard Ducommun* (1865-1951) estis konata instruisto-pedagogo, socia aktivulo kaj organizanto en Les Brenets/NE kaj en Le Locle/NE. En 1901 ĉi tiu Eo-pioniro de 1899 malfermis en Les Monts sur Le Locle la unuan Eo-kurson por infanoj kun la celo starigi en 1903 la interlernejan korespondadon per Eo inter diversnaciaj gejunuloj. En 1904 Ducommun fondis kaj dum 20 jaroj prezidis la lokan EG de *Les Brenets* - samtempe li rolis kiel vicprezidanto de la EG *Le Locle*. Ankaŭ lia edzino, liaj bofratinoj (Droz) kaj iom poste ankaŭ liaj tri infanoj aliĝis al la Eo-movado.

En la urbo Le Locle aktivis, krom Ducommun, Dubois kaj *Henri Favre* (1878-1961) ankaŭ *Paul Humberst* (1883-1968), instruisto mezgrada-duagrada pri franca kaj germana lingvoj, poste pri itala lingvo en la komerca lernejo. Kiel e-isto ekde 1903 (kun atesto pri kapableco en Parizo kaj supera diplomo en 1907) li instruis Eon en publikaj kursoj en Le Locle kaj La Chaux-de-Fonds (1907-28) kaj verkis multajn artikolojn. Li partoprenis en la 2a UK en Ĝenevo en 1906 kaj en la Eo-mondkongresoj en la sekvaj jaroj ĝis Berno 1913. Ekde 1910 li estis ano de la ekzamena komitato de SES, krome SAT-delegito. Aliaj lokaj aktivuloj nomiĝis Marie Marchand, instruistino, Th. Roniger, P. Girard, Mathilde Meylan-Jeanmairet (+1938) kaj Louise Perrenoud-Jeanerret (1880-1951), la patrino de la posta e-isto kaj KCE-kasisto →*René-William Perrenoud* (1904-96). En 1906 Favre havis 40, Ducommun 65 Eo-kursanojn. Pri la lokla EK ekzistas protokoloj inter 1904 kaj 1926 (CDELI).

Ŝajnas, ke L.L. Zamenhof dissendis sian *Unuan Libron* ankaŭ al framasonaj loĝioj kaj judaj cirkloj, tiel ke en La Chaux-de-Fonds kelkaj framasonoj kaj judoj, ekzemple familio →*Wolf*, interesiĝis pri Eo. En tiu urbo la muzikinstruisto Bernard Junod aranĝis en 1904 malgrandan Eo-ekspozicion, kaj unu jaron poste →*Jean Wenger* prelegis en la komercista societo pri la nova lingvo.



Eo-prospekto pri Neuchâtel (dato nekonata)



E-ista kunveno en Neuchâtel 1907



Neuŝatela Kantona Festo Esperantista en La Tourne, 5a de julio 1908



Sur la montosupro Rocher de Tablette en La Tourne



Kunveno de neŝatataj e-istoj en Cernier (la foto aperis en SE 9/1909)



Omaĝo al Esperanto far la Esperanto-Grupo de La Chaux-de-Fonds, en 1924

La loka EG mem estis fondita ne pli malfrue ol en 1906 de *Jules Wolf* (1887-1944), ano de juda familio alzac-devena. Kiel rakontis la bofilino Mathilde Wolf al Claude Gacond, la patro de Jules Wolf, Philidor Wolf, verŝajne estis ricevanto de la unuaj Eo-lernolibroj, senditaj rekte de L.L. Zamenhof el Varsovio tra la sinagoga medio en La Chaux-de-Fonds. Evidente patro Philidor instruis Eon al Jules,

kiu poste gvidis la EG dum du jardekoj en diversaj funkcioj. Mathilde Wolf mem verkis la teatraĵon *Patreco*, kiun anoj de La Chaux-de-Fonds prezentis en la UK en Berno (1913).



Jules Wolf

Ankaŭ en la ĵurasa horloĝa metropolo ne raris tiam Eo-manifestacioj kun kelkcentoj da partoprenantoj. Al la frua tempo de la loka EG apartenis ankaŭ la forgesitaj samideanoj *Carlo Picard* (1882-1926) kaj *Charles Rosen* (1871-1948), kiu aliĝis al la movado en 1907. Rosen multe tradukis en Eon precipe el la rusa lingvo, verkis originalajn novelojn, kunlaboris kun la revuo *Esperanto*, gvidis kursojn en Ĝenevo kaj La Chaux-de-Fonds, kie li estis UEA-delegito inter 1908 kaj 1912. Krome li estis ano de la provizora komitato de UEA post la disdubiĝo (1936-46).

La EG de *La Chaux-de-Fonds* estis reorganizita en 1916 de *Emma Crisinel*, kiu trapasis la superan diplomon de SES en 1920 kaj transprenis ĝian prezidon. En 1920 Wolf kaj lia edzino Mathilde evidente sukcesis konvinki la edukinstancojn enkonduki nedevigajn Eo-kursojn en la unuagradan lernejon. En 1935 la estraron de la loka EG konsistigis apud Jules Wolf kiel honora prezidanto ankaŭ *René Zollinger* (1912-1992) kiel prezidanto, Chs. Eckert, kasisto, Jeanne Crisinel, sekretariino kaj Amélie Montandon, helpantino. En 1969 la EG estis prezidata de →Max-Henri Béguin (1918-2000). La estraro en 1975 estis la jena: Hélène Berger (prezidantino), John Thum (vicprezidanto), Francisco Pérez (sekretario), Jeanette Thum (kasistino; +1978). Aliaj estraranoj estis →*Claude Gacond* (*1931), UEA-delegito en La Sagne/NE en la 1950aj jaroj,

lia edzino →Andrée Gacond-Giroud (*1933) kaj ties fratino Cosette Sandoz-Giroud (iama nomo: Cop; 1937-2001), e-istino de 1953 kaj iama UEA-delegitino. Sekve al la starigo de →CDELI kaj de →KCE/→GEP la loka EG de La Chaux-de-Fonds kunfandiĝis kun la novaj lokaj Eo-institucioj, kiuj ekestabliĝis en la 1960-70aj jaroj. Ĉi tiuj institucioj kompreneble helpis, ke →La Chaux-de-Fonds ricevis apartan signifon en la planlingva kaj Eo-movadoj, iusence fariĝante unu el la ĉefurboj de Esperantujo.




Andrée, Cosette kaj Gabrielle Gacond



Claude Gacond, Maurice Favre, Mireille Grosjean

Suba kantona parto / urbo kaj regiono N.: La unua nomaro de SES-anoj, publikigita en *Svisa Espero (SE)* en 1903, listigis krom unuopuloj en la urbetoj Colombier, Couvet, Môtiers, Saint Aubin, Vaumarcus kaj Ponts-de-Martel ankoraŭ aliajn Eo-adeptojn: F. Lecoultre kaj G. Nicolas, instruisto kaj bankisto en N., kaj precipe *Hermann Stroele* (1880-1921), astronomo en la neŭŝatela observatorio kaj universitata docento, kies frato →*Georges Stroele* (1879-1943) apartenis al la unua generacio de svisaj e-istoj. Georges Stroele estris la lokan EG en *Couvet/NE* kaj kun sia frato Hermann iniciatis la neŭŝatelan EG, gvidis Eo-kursojn, membris en la CK de SES kaj estis ankaŭ prezidanto de la ekzamina komitato de SES.



Pierre Hirsch (maldekstre) prelegas kadre de la EG La Chaux-de-Fonds en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, en 1969

Estis faritaj diversaj prelegoj, aperis gazetartikoloj, ekzemple en la organo de la komerca unuiĝo *Unioniste*, kaj eĉ instaligis ekspozicio pri Eo, kiun vidis ĉirkaŭ mil personoj (*SE* 10-12/1905). Eo-kursoj kun pli ol 250 lernantoj estis organizitaj de la Societo de Utileco Publika, de la Svisa Societo de komercistoj (neŭŝatela sekcio) kaj de la Unio Komerca. Laŭ la societa protokolo, kiu estas originale konservita (CDELI), la 26an de februaro 1906 okazis en la salono de la ĝenerala konsilio en la urbodomo de N. la fonda kunveno kaj unua ĝenerala jarasembleo de la *neŭŝatela EG* (Groupe Espérantiste de N.), kun sepdek da ĉeestantoj kaj sub la provizora prezido de Hermann Stroele, kiu prezentis statutprojekton. Ĉar Hermann Stroele pro diversaj kialoj rifuzis kandidatiĝi kiel grupa prezidanto, estis elektita →*Jean Wenger* (1881-1960) per 54 voĉoj (Stroele ricevis 5 voĉojn). Aliaj estraranoj fariĝis H. Stroele (50 voĉoj), P.-E. Bonjour, J.-Ed. Matthey, s-ino Roulet-Wavre kaj f-inoj M. Breithaupt kaj B. Perroset. Kiel honoraj membroj estis elektitaj: d-ro Albert Schinz, profesoro de la universitato en Philadelphia, Jules Lecoultre, profesoro de la neŭŝatela universitato, d-ro Chs. Ed. Guillaume, dua direktoro de la Internacia Oficejo por pezaj kaj mezuroj en Parizo, →*Jean Borel* (1868-1946) kaj Alfred Paul Dubois, lerneja direktoro en Le Locle. Sian elmigrantan fra-

ton Jules (1873-1947) Jean Borel sekvis en 1903 al Germanio, kie Jules gvidis la presejon kaj Eo-eldonejon Möller & Borel GmbH.



Georges Stroele, Jean Borel kaj Jean Perriard

La jarkotizo por 1906 estis fiksita je 2 frankoj. Tuj post la ĝenerala asembleo la komitato disdividis inter si la taskojn jene: Wenger (prezidanto), Bonjour (vicprezidanto), Stroele (sekretario, ekde 1907 vicprezidanto), Matthey (kasisto-bibliotekisto, Roulet-Wavre kaj Perroset (asistantoj); la dua sekretario Breithaupt demisiis en junio kaj estis anstataŭita de f-ino A. Adam. En majo la komitato konfirmis la aliĝon de *Jean Perriard* (1889-1975) el Boudry, kiu poste retroviĝis inter la kunfondantoj de Svisa sekcio de IKUE. La nomo de Georges Stroele aperis en la protokolo de la oktobra kunsido de la komitato de la neŭŝatela EG. Li ricevis la taskon instrui Eon al la viroj, dum →Jean Wenger transprenis la instruadon al la virina grupo. En 1911 Georges Stroele akceptis la prezidon de la societo; sekretariino fariĝis Cécile Schütz, poste f-ino S. Stucky. En 1913 la protokolo mencias A. Adam kiel prezidantino de la neŭŝatela EG, en 1918 tiu ofico estis transprenita de *Emma Chenevard* (1884-1939). La ĉilasta estis jam en 1913 bibliotekistino de la societo kaj en 1917-18 ankaŭ provizora prezidantino de SES; en 1919 ŝi estis listigita de la *Jarlibro* de UEA kiel ĝia delegitino en N. Poste ŝi aliĝis al la reformprojektoj de →René de Saussure, transprenante la taskon de sekretariino de la t.n. Akademio Esperantida (ĉ. 1924) kaj pli malfrue de la t.n. Nov-Esperanta Akademio (1932).

Inter aliaj neŭŝatelaj agadoj elstaris ankaŭ prelego de la franca e-isto Théophile Cart (1855-1931) en 1906 antaŭ 800 personoj (*Journal de Neuchâtel* detale raportis), Eo-

ekspozicio en Collège de la Promenade kaj Eo-kurso kun 120 partoprenantoj.

En 1908 la neŭŝatela EG organizis novan propagandan manifestacion, nomitan vesper-festo, kiun partoprenis kvincento da homoj. „La sukceso estis plena kaj superis ĉion esperitan“, raportis *SE*. La membronombro de la EG kreskis al 123. En la sama jaro, en julio, okazis kantona e-ista kunveno en La Tourne (de kiu konserviĝis belaj fotoj de Edouard Ducommun, vd. supre).

Nature ne mankis ankaŭ negativaj spertoj. Ekzemple Max Niedermann, profesoro pri lingvoscienco en la neŭŝatela universitato (tiam nomata Akademio), publike prelegis pri la problemo de la neŭtrala universala lingvo. Antaŭ klera aŭdantaro li deklaris, ke artefarita lingvo ne estas vivipova kaj kritikis la e-istojn, kiuj laŭ li faras vanan laboron. Hermann Stroele, kiu ĉeestis tiun prelegon, firme rifuzis la kritikon de la skeptika profesoro. La gazetraportoj subtenis la vidpunkton de Stroele kaj la leciono de Niedermann finfine montriĝis fiaskinta.



Jean Wenger kaj filo Maurice Wenger (dekstre)

Baldaŭ aperis en N. →*Edmond Privat* (1889-1962), kiu estis konsiderata kiel unu el la plej kompetentaj kaj elokventaj reprezentantoj de la Eo-movado. En septembro 1908 la ĝenerano prelegis antaŭ 200 personoj pri la dezirinda enkonduko de la nedeviga instruado de Eo en duagradajn kaj komercajn lernejojn de la neŭŝatela kantono. Poste, 1945-59, Privat trovis laborlokon kiel ordinara profesoro pri anglaj lingvo kaj literaturo en la neŭŝatela universitato. Sub la influo de Privat multaj neŭŝatelaj e-istoj fariĝis e-istoj.



Edmond Privat kaj Perre Bovet

Dum Privat estis ĝenevano laŭ deveno, lia kolego →*Pierre Bovet* (1878-1965) estis denaska neŭŝatelano, naskita en Grandchamp-Boudry/NE. Bovet studis klasikan beletron en la universitato de N. (1897-98), kie li diplomiĝis. Poste li laboris kiel instruisto pri filozofio en la kantona gimnazio de N. (1903-12), ekde 1919 en la ĝeneva universitato, kie li gvidis la Instituton Jean-Jaques Rousseau kaj kie ankaŭ lia poresperanta agado atingis sian kulminon.

En tiu epoko la homoj estis societemaj kaj facile kuniĝis en grupoj, tiel ke aperis diversaj lokaj grupoj kiel menciite en Couvet (prezidanto H. Biolley, kun 43 membroj), Le Locle, Les Brenets, sed ankaŭ en La Chaux-de-Fonds kaj Dombresson. Laŭ *Vespera Horo* (n-ro 6/1910) ankaŭ la e-istoj de *Chézar*, *Cernier* kaj *Fontainemelon* starigis lokan EG kun 12 membroj, sub la prezido de Edgar Thiébaud. Edouard Matthey instruis Eon en *Travers* kaj rezultigis en 1907 la fondon de loka EG kun la instruisto Charles Parel kiel prezidanto. *SE* 1/1907 raportis, ke en la urbo N. alia EG fondiĝis inter lernantoj de la komerca lernejo.

En la 1920aj jaroj la neŭŝatela EG havis la statuson de ĉefgrupo de SES, kio signifis, ke ĝi estis unu el la plej aktivaj lokaj Eo-societoj. En tiu periodo oni trovas ankaŭ la nomon de *Louise Perrenoud-Jeaneret* (1880-1951), kiu en 1922 fondis privatan lernejon por fremdlingvaj junulinoj dezirantaj formiĝi kiel dommastrinoj. Aktivante ankaŭ en virinrajtaj medioj, Louise Perrenoud lernis Eon en 1903. En 1917 ŝi gvidis Eo-kurson por distri blindajn francajn soldatojn, kiuj

restadis en Les Brenets/NE kaj helpis al aliaj Eo-lernantoj. Ŝia filo →*René-William Perrenoud* (1904-1996), uzante Eon de 1907, revenis al la Eo-movado en la 1950aj jaroj por poste kunlabori precipe kun KCE kiel ties librotenisto. René-William Perrenoud cetere tute ne estas parenco de →*William Perrenoud* (1898-1984), alia tre aktiva neŭŝatela e-isto, aŭtoro de la →geonismo kaj de →La ora metodo, kies koncernaj broŝuroj estis eldonitaj en N.




Louise Perrenoud kun infanoj

Alia aktiva neŭŝatelanino, kiu mortis en 1926, estis *Emilie Straub*; ŝi rolis kiel sekretario de la neŭŝatela EG, estis UEA-anino, SES-komitatanino kaj kursgvidantino (kun supera diplomo de SES) ĉirkaŭ la jaro 1908. En 1927 forpasis Fritz Hodel (1875-1927), plia sindonema ano de UEA en N. Al la neŭŝatela ES multajn jarojn apartenis ankaŭ Berthe Breguet, kiu estas listigita inter la partoprenantoj de la 2a UK en Ĝenevo. Ŝi mortis en 1954 en La Tour-de-Peilz/VD.

Plia notinda e-isto nomiĝis *Jean-Rodolphe Laederach* (1910-2005), kiu pasigis sian profesion vivon kiel protestanta pastoro en Serrières/NE kaj dum 37 jaroj redaktis la komunuman monatan bultenon *Le journal de Serrières*. Li malkovris Eon en 1924, estis

ankaŭ membro de SES kaj KELI kaj loĝis en Peseux/NE. (→Kristanoj)

Postmilite dum multaj jaroj la neŭŝatela ES estis gvidata de d-ro *Alfred Wenger* (1917-2003), kiu estis la nevo de →*Jean Wenger* kaj la kuzo de *Maurice Wenger* (1913-1987), kiu same iom interesiĝis pri Eo. Profesie Alfred Wenger estis kuracisto-pediatro, kiu doktoriĝis en la ĝeneva universitato en 1948 kaj laboris kiel pediatro en N. (ĝis 1984). Li lernis Eon en 1951 en kurso de *William Perrenoud*, estis UEA-delegito, kunlaboranto de SES kaj apoganto de KCE. Post sia emeritiĝo li translokiĝis al *Chez-le-Bart/NE*.




Alfred Wenger en 1999 kaj kiel pianisto



Alfred Wenger kaj lia edzino Liliane

Aktiva membrino de la neŭŝatela ES estis *Gabrielle Gacond-Lüscher* (1908-1999), la patrino de →*Claude Gacond*. Ŝi ekhavis simpatian por la zamenhofa lingvo pere de la gazetartikoloj de *Edmond Privat* en *L'Essor*. Lerninte Eon en sia 60a jaraĝo, ŝi ĉeestis ĝis en sia alta aĝo la kunvenojn de la loka ES por plenumi diversajn taskojn kaj oficojn, same ĉe KCE kaj CDELI. Tiel ŝi povis sperti, ke

per Eo larĝigis ŝia viv- kaj penshorizonto, kiel raportis la koncerna nekrologo en *SES informas*.



Alfred Wenger kaj Edouard Waldvogel

La protestanta teologo kaj pastoro →*Edouard Waldvogel* (1893-1994) estis multflanka kristano kaj pacaktivulo, kiu en la 1920aj jaroj prizorgis la paroĥojn de *Les Eplatures* apud *La Chaux-de-Fonds/NE*. Waldvogel oficis kiel UEA-delegito kiam li loĝis postmilite en *Chez-le-Bart/NE*. Lia nevo *Jean Waldvogel* (*1914), loĝanta en *Gorgier/NE*, lernis Eon en 1959 kaj partoprenis plurajn Eo-aktivecojn en- kaj eksterlande. En 1929 al la Eo-movado aliĝis *Robert Frochaux*, kiu lernis Eon pere de kurso de *Radio Ĝenevo*. En 1959 li fariĝis delegito de UEA en *Boudry/NE*, kies dumviva membro li estis. *Frochaux* laboris sinsekve kiel librotenisto-oficisto, fotografo kaj flegisto/dom-zorganto. Kiel grava funkciulo de la skolta movado en la 1930aj jaroj li rolis kiel konsulo de *Skolta Eo-Ligo*, kie li gvidis Eo-kursojn. Ekde 1964 li servis kiel konsulo de *IKUE*. Entute *Frochaux* montriĝis tre fervora Eo-propagandanto.

Ankaŭ la sekva e-ista kvaropo aŭ devenis el la neŭŝatela kantono aŭ estis ligita kun la Eo-movado en tiu regiono: *Jean Perriard*, →*Marcel Jaccard*, →*Jules Gilliard* kaj →*Charles Ecabert*. La memor-ekspozicio pri *Edmond Privat* kaj *Charles Ecabert* en la supera komerca lernejo de N. en 1963 trafis la adekvatan intereson de la publiko. Kiel studenta pastoro aktivas en N. *Norbert Martin* (*1945), kiu iam kunlaboris kun KCE kiel ties komitatano.



Robert Frochaux kaj René Zollinger



Marcel Jaccard, Jules Gilliard kaj Charles Ecabert

En Savagnier/NE loĝas *Jean-Thierry von Büren* (*1955), poliglota e-isto kaj instruisto en komercaj lernejoj kaj liceo, kiu estas konata ankaŭ pro sia politika, kultura kaj ĉefe muzika engaĝiĝo en diversaj komisionoj kaj medioj. La bulgara e-istino Sonja Bétrix Koleva (*1970) loĝas en Travers/NE kiel edzino de kamparano kaj laboras en N. kiel juristino. Ŝi eklernis Eon en 1985, loĝas de 1990 en Svislando kaj iam kunlaboris kun KCE/GEP. En la neŭŝatela kantono vivas ankoraŭ aliaj e-istoj, kiuj estas aliloke prezentitaj en ĉi tiu enciklopedio: →Mireille Grosjean, →Maurice Favre, →Giorgio Silber, →Perla Martinelli, Marion kaj Mario Bélisle-Grosjean (→Familianoj), Marie-Louise Münger (→Kristanoj). La alternativa lernejo La Grande Ourse kaj ĝia direktorino Véra Zaslavsky en La Chaux-de-Fonds ofertas Eo-lecionojn al siaj junaj gelernantoj, engaĝigante Eo-instruantojn el diversaj landoj (→Instruado).



Claude Gacond, Jean-Thierry von Büren kaj Marion Bélisle-Grosjean en Rolle, septembro 2003.

La jarkunveno de SES okazis kvarfoje en N.: en 1916 en la urbodomo, en 1933 en la salono de la granda konsilio, en 1955 kaj en 1996 en la stacidoma restoracio. Precipe la kunveno en la jaro 1916 en la ĉeesto de 80 personoj kaj kun la partopreno de →René de Saussure devis esti plena de ĝojo, energio kaj optimismo.

NIDWALDEN
→UNTERWALDEN

O

OBWALDEN → **UNTERWALDEN**

Immanuel OLSVANGER

1888-1961

O. estis la filo de respektata juda komercisto (R. Jizchak Sew O.), kiu siaflanke estis rabeno de Sankt Peterburgo.

O. mem studis medicinon kaj filologion en la universitatoj de Königsberg (Germanio) kaj Berno (Svislando), doktorigante en 1916 en la berna universitato pri la temo 'La entombigo ĉe la judoj, el lingvistika kaj morhistoria vidpunktoj'. Kiel filologo O. faris ampleksajn studojn sur la kampo de la juda folkloro kaj prelegis en multaj landoj pri judaj moroj kaj pri la juda humuro. Taskita de la Svisa Etnografia Societo, kies sekretario li estis, O. prilaboris folklorologian kolekton de judaj (jidlingvaj) popolrakontoj, kantoj, anekdotoj ktp., kiu aperis sub la titolo *Rosinkess mit Mandlen* (1920 Basel; 2a eld. 1931; 3a eld. 1965 Zürich). En judaj medioj O. famiĝis kiel ĵurnalisto kaj tradukisto, kiu tradukis verkojn el la lingvoj hebrea, itala, rusa, japana, sanskrita k.a. kaj en la lingvojn germanan, anglan, jidan, hebrean kaj Eon (ekz. *Dia Komedio* de Dante, parton de la upaniŝadoj kaj *Bhagavadgito*, krome poemojn de Goethe kaj Heine). Kiel aktivulo de la cionista movado en 1912 O. iniciatis la fondon de Hechawer, la monda unuiĝo de judaj studentoj; ĉi tiu asocio ludis gvidan rolon en la cionista movado de Eŭropo kaj dum iu periodo estis prezidata de O. mem. Krome O. ekrlatis kun la juda komunumo Ben Israel en Hindio kaj verkis la historion de tiu komunumo. En 1921-24 O. restadis en Sudafriko, kie li aga-


dis por la cionisma movado. Fine de 1924 O. revenis al Londono, kie li plenumis altan ŝtatan funkcion. Post la fondo de la juda ŝtato en 1948 O., kiu edziĝis en 1913 en Berno, translokiĝis al Israelo, kie liaj posteuloj vivas.

O. apartenis al la veteranoj de la Eo-movado, pasigante multajn jarojn en Svislando kiel membro de la lokaj EG en Bazelo, Zuriko kaj Berno. En 1913 li deĵoris kiel sekretario de la 9a UK en Berno. Lian oratoran talenton oni komparis kun tiu de Ivo Lapenna (1909-87). En Eo O. verkis la oficialan nekrologon pri L.L. Zamenhof en *SE* (1917), skribis pri la juda koloniado de Palestino, prezidis Palestinan Eo-Ligon kaj en 1959 estis akceptita kiel membro de la Akademio de Eo.

LA ORA METODO

Lernmetodo por „plej rapide lerni Eon“ evoluigita de → *William Perrenoud* (1898-1984), kaj aperinta en 1956. La O. baziĝis sur la konscio, ke per sia lingva strukturo, Eo diferencigas de la grandaj kulturlingvoj, al kiuj ĝi tamen similas, kaj ke ĝi prezentas kazon unikan. „La klareco de l'gramatiko, la foresto de ĉiu senutila malfacilo, la senlima valideco de la reguloj faras, ke Eon oni lernas pli rapide ol la ceterajn lingvojn.“ (OM, p.1.). La adjektivo *ora*, en kiu kaŝiĝas la ŝlosilo de la metodo de Perrenoud, ne estas koloro aŭ metalo, sed signifas mallongigon por la du vortoj: *ordigitaj radikoj*. La O. do estas la metodo de la ordigitaj radikoj. Siajn analizojn, deduktojn kaj konkludojn Perrenoud klarigis jene: „Ne estas indiferente, laŭ kiu sinsekvo oni prezentas la elementojn. Se vorto urĝe bezonata ne aperas tuj en la mensio, la studado ne povas konvene progresi, aŭ eĉ stagnas. La lernanto ne scias plu orientiĝi, perdas la ĝojon kaj kuraĝon kaj ĉesas labori, plej ofte ne konsciante la kaŭzon de sia malsukceso. Aŭtoro de lernolibro devas do plej zorge pripensi kaj sagace difini la ordigon de la elementoj.“ Komparante la *Unuan Libron* de Zamenhof kun ĝiaj 920 malsamaj vortoj kaj la *Plenan Vortaron* de SAT kun ties suplemento, kiu enhavas 10'000 malsamajn vortojn. Perrenoud konstatis, ke en ambaŭ vortaroj ekzistas iu „baza vortprovizo“, kiu kreskis nur malmulte, kaj iu „aldona vortpro-

vizo”, kiu kreskis potence. La baza vortprovizo konsistas el vortoj gramatikaj („finiĝoj“ /aŭ finaĵoj/, afiksoj, prepozicioj, numeraloj ktp. kaj 300 baz-elementoj). Laŭ Perrenoud ĝuste tiu baza vortprovizo havas eksterordinaran gravecon, ĉar ĝi formas ĉirkaŭ 58% de iu averaĝa teksto en Eo. Tial konante tiujn baz-elementojn, lernanto tuj povas kompreni tri kvinonojn de iu ajn teksto en Eo. Kompreninte tion, Perrenoud dividis la bazan vort-provizon en 20 lecionoj po 45 minutoj, en kiuj estas instruataj po 15 elementoj. La aŭtoro kalkulis, ke por alproprigi la materialon estas bezonataj 48 lecionaj horoj. Anstataŭ la nigra tabulo la aŭtoro uzis slipojn, entute 181, kiujn oni pendigis sur ŝnuro.



William Perrenoud

Sian daŭrigan kurslibreton *En tempo rekorda*, kiu aperis en 1960, Perrenoud konstruis tiel, ke ĝiaj dek ekzercoj konsistas el vortoj konstrueblaj el la slipoj, kiuj elformas en la lernanto valoran kapablon de kombinado. La aŭtoro proponis gradigitajn tekstojn bazitajn sur nur 50% de la nombritaj baz-elementoj.

Kritiko: En sia grava verko *Metodologio de Eo* la signifa hungara esperantologo István Szerdahelyi (1924-87) dediĉis kvin paĝojn al la O. de Perrenoud. Laŭ lia juĝo la O. ja enhavas kelkajn seriozajn elementojn de la planita instruado. Samtempe Szerdahelyi bedaŭris, ke ĝi konstruas la algoritmon nur por la t.n. bazaj elementoj kaj tute preteratentas la ceterajn. Same en la grupo de „vortoj diversaj” la elekto de kelkaj elementoj jam ne baziĝas sur ekzaktaj parametroj, sed estas elektitaj empirie.

Dank’ al sia sistemeco kaj logiko la O. rapide disvastiĝis kaj ĝia praktiko helpis novajn

metodikajn malkovrojn i.a., ke Eo devas esti instruata alimaniere ol nacilingvoj kaj ke ekzistas en la lingvo bazaj strukturoj, kies instruado ankaŭ devas esti gradigita.



La broŝuretoj de Perrenoud pri *La ora metodo* kaj *En tempo rekorda* tamen ne maltrafis sian efikon

Kvankam oni ne konservis aparte pozitivan memoron pri la pedagogia talento de Perrenoud, ambaŭ liaj etformataj broŝuretoj kun ties geonisma filozofia fono (→geonismo) entute ludis gravan rolon por la instruado de Eo, ĉar ili atentigis la verkantojn de Eo-kursoj pri la apartaĵoj de la zamenhofa lingvo. Malgraŭ tiu kritiko la pedagogiaj konkludoj de Perrenoud iom influis la Eo-metodologojn. Granda parto de la metodika aktiveco (rekta metodo) de EES kaj poste de KCE estis inspirita de la O. de Perrenoud. Tamen poste la metodo apenaŭ plu estis aktive uzata. Kiam en 1997 →Bruno Graf, prezidanto de SES, utiligis la metodon en publika informvespero pri Eo en Berno, ĝi postlasis impreson de arkaika maniero prezenti Eon al la moderna publiko de la komputila epoko.

- William Perrenoud →Geonismo
- Instruado de Eo en Svislando
- Kastelo Münchenwiler →Bibliografio